



Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 8 Aŭgusto, 2010

Kara Leganto! Lunde frumatene, antaŭ nia julia kunsido, telefonis al la redakcio Andreo Kolganov kaj malgaje pardonpetis pro la morgaŭa NE-prelego – forpasis lia patrino. Kara Andreo, la tuta E-societo sincere kondolencas: restu ŝi en paco!..

La saman tagon vic-prezidanto s-ro Kordylewski estis petata gvidi la kunsidon kaj priparoli la pasintan UK-on en Kubo, kion li volonte plenumis. Bedaŭrinde, usonanoj ne multis sur la Insulo de Libero pro certaj kaŭzoj, pro tiu sur la paĝoj de nia bulteno aperos prikongresaj materialoj de niaj amikoj eksterlandaj (Kostariko, Ukrainio...), verkitaj speciale por “Saluton!”.

Interesan antaŭkongresan enketon faris svisa samideano A. Künzli, kiu afable permesis al nia eldonaĵo aperigi la rezultojn. Dankon, s-ro Andreas.

–La Redakcio

UK en Havano (I)

Ĉifoje la UK okazis en Havano. Mia antaŭa vizito al Havano okazis en la jaro 2004 – partopreno en la Sesan Tutamerikan Kongreson de Esperanto. Veturante nun de flughaveno al hotelon mi rimarkis kelkajn eksterajn ŝanĝojn: novajn konstruaĵojn kaj kune kun la malnovaj usonaj aŭtoj, kiuj mirinde, danke al zorgado de kubaj mekanikistoj ankoraŭ movadas, estas multaj novaj aŭtoj faritaj en Japanio, en Ĉinio kaj en landoj de Eŭropo.

La kongresejo estas “Palacio de las Convenciones”. Ĝi estas granda kaj komforta loko sed iom malproksima el centro de la urbo. Pro tio mankis al mi la oftaj promenadoj en Malnova Havano, kiujn mi tre ĝojis dum mia pasinta vizito. Dimanĉon, la 18-an de julio, ekkongresis. Pli ol milo da partoprenantoj el 59 landoj kunsidis ĉe la plej grava jara esperanto-aranĝo. La kongresa temo estis “Interproksimigo de kulturoj”. La Ĝenerala Asembleo de UN proklamis 2010 la Internacia Jaro de Proksimigo de Kulturoj, taskante al Unesko la rolon kunordigi tiucelan agadon. Sinjoro Probal Dasgupta, prezidanto de UEA, en sia parolado ĉe la Solena Inaŭguro de 95-a UK diris, ke “antaŭe la idealistoj kutime pledis por idealoj unuecigaj. En unu lando ili pledis por nacia unuecigo. Sur la monda skalo ili strebis al harmonio, kiun ili komprenis kiel sendivide, sendiference unuecigitan homaron. Sed ni hodiaŭ lernas deziri unu konektitan planedon, kiu estimas kaj flegas ĝuste la diversecon. Tiu ĉi lernado



okazas ne nur en Esperantujo: la media katastrofo devigas nin serĉi vojojn por savteni la vivdiversecon kaj disvolvi aliajn parencajn diverseco-ideojn. Sed ni esperantistoj jam de longe pioniris, kaj veterane kultivas, similan kampon. Ni laboras por savteni la diversecon de konversacioj. Ni aspiras al tutplaneda konversacio inter la lokaj kaj regionaj konversacioj, kiu savtenas ilian lokan kaj regionan vigecon kaj pere de ili la demokration.” Mi

mem salutis la Kongreson (vd foton): “Se la kuba poeto José Martí diris, ke “Gepatra Lando estas Homaro”, mi aldonas la vortojn de kostarika poeto Jorge Debravo: Mi volus forviŝi ĉiujn landlimojn kaj lasi kiel limon interhoman nur la aeron”. Nome de la Kostarika Esperantistaro mi salutas kaj gratulas vin kaj deziras sukcesan kaj fruktodonan kongreson!”

La kongresa programo estis tre riĉa: faka forumo, sciencaj prelegoj, esperantologio konferenco, oratora konkurso, Tago de la lernejo, Internacia kongresa universitato, junulara programo, artaj aranĝoj, ekumena diservo, libroservo, kurso pri “salsa” dancado, kurso de la hispana lingvo. Kiel diris sinjoro Dasgupta, “la similoj kaj la malsimiloj, ambaŭ grave rolas en la amikeco”. Tial mi pli fortigis la amikecon kun gesamideanoj el Kubo kaj de aliaj landoj el Ameriko kaj ankaŭ amikiĝis kun gesamideanoj de malsamaj partoj de la mondo, pere de nia simileco: ESPERANTO.

Dum ekskurso mi fotis la Monumenton de Sendependeco kun statuto de José Martí (1853-1895) kaj aldonas E-tradukon de lia fama poemo “Guantanamo” (elhispanigis G. Morales).

–Guido Hernández Marín, Kostariko



*Kultivas mi rozon blankan
En tag' vintra aŭ somera
Por la amiko sincera
Al mi la manon donanta
Por la kruelul' ŝiranta
Mian vivigantan koron
Ne kardon sed ankaŭ floron
Kultivas mi rozon blankan
Se vidas vi monton luman
Mian verson vidas vi
Ĉar monto ja estas vi
Kaj ankaŭ ventumil blua
Kun la malriĉa homaro
Dividos mi mian sorton
Rojo fluanta el monto
Plaĉas al mi pli ol maro*



Enketo Inter UEA-delegitoj

Nun, kiam la vica 95-a UK jam sukcese finis sian laboron, nia bulteno “Saluton!” prezentas la rezulton de la privata enketo inter la UEA-delegitoj, kiun Andreas Künzli (nia info: A. K. n. en 1962 en Lucerno, svisa E-isto/interlingvisto, slavisto kaj informadikisto, FD de UEA, 1985-91 ĉefredaktoro de TEJO Tutmonde, redakciano de multaj revuoj), efektivigis en printempo 2010 inter la delegitaro de UEA pri la kelkaj demandoj lige kun la “Homaj rajtoj”, inter alie rilate al la ĉijara kongreslando Kubo, kaj la neŭtraleco de UEA. La redakcio ne nur sciigas la statistikan rezulton de la enketo, sed posedas ankaŭ la plej interesajn komentojn de la respondintoj, kiujn ni pridiskutos dum nia sekvanta aŭgusta kunveno.



D[emandoj] 1a. Ĉu vi konsentas (apogas) la okazigon de la UK en Kubo, malgraŭ tio, ke la Homrajta Konsilio de UN kritikis la registaron en Havano pro la drasta malrespekto de la homaj rajtoj? – Jesis 133, neis 34 respondintaj delegitoj. Tio signifas, ke la granda plimulto apogas la okazigon de UK en Kubo, malgraŭ la konataj homrajtaj problemoj.

D. 2a. Ĉu vi konsentas (apogas), ke UEA ankaŭ en estonto okazigu UKojn en landoj, kiuj havas, laŭ kriterioj de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, drastajn problemojn kun homaj rajtoj, kiuj profunde kontraŭdiras tiun Deklaracion en multaj punktoj? – Jesis 122, neis 47.

D. 3a. Ĉar laŭ sia statuto UEA defendas la homajn rajtojn, ĉu laŭ vi UEA devus videble (publike) admoni (postuli) la respektadon de la homaj rajtoj en la koncernaj landoj tra siaj Landaj k Fakaj Asocioj, eĉ se tio kontraŭdiras la neŭtralecon de UEA? – Jesis 80, neis 82.

D. 4a. Ĉu vi vidas kontraŭdiron inter la (politika) neŭtraleco de UEA kaj la emfazo de la homaj rajtoj fare de la sama UEA? – Jesis 50, neis 112.

D. 5. Ĉu vi komprenas, kion UEA celas diri per “Lingvaj rajtoj”? – Jesis 125, neis 37.

Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – D-ro Les Kordylewski
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas
je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.**

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

24an de Aŭgusto – kunsido dediĉata al UK en Havano

28an de Septembro – denove pri tradukarto kaj ATA (V. Pajuk)

26an de Oktobro – temo estos anoncata